



# Kulturaj Kajeroj

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO  
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, eks. prezidanto de la Kulturdomo de Franclingvaj Esperantistoj

**JARABONO**

Jarabono : 80 fkoj

P. BABIN  
Le Haut des Bourrellières  
17, rue Romain-Rolland  
85100 Le Château-d'Olonne  
P.C.K Nantes : 2.813.61 L


(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

**1998 — 2**

(APRIL - MAJO - JUNIO)

# EN TIU ĈI NUMERO

vi povos legi pri...



... la abatejo de Fontevraud



... kaj la sudmaraj insuloj

# KULTURAJ KAJEROJ

## TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

### REDAKCIA KOMITATO:

Jeannine VINCENT  
26bis, rue de Milngavie  
F-49150 BAUGE

Pierre BABIN  
17, rue Romain Rolland  
F-85180 CHÂTEAU D'OLONNE

### ENHAVO

|                           | paĝo  |
|---------------------------|-------|
| El Grésillon              | 1     |
| Esperanto tra la Mondo    | 2     |
| La centjara franca Movado | 3-5   |
| Sudmaraj Insuloj          | 6-8   |
| Vidocq                    | 9-11  |
| Fabelo                    | 12-13 |
| Por via Distro            | 14    |
| La Vivo en Grésillon      | 15-16 |

## EL GRESILLON

La bieno restis silenta dum la tuta somero. La aliĝintoj ricevis informon pri la nuligo de la somera programo kaj ilia antaŭpago estis, laŭ ilia elekto, repagita. Feliĉe la korespond-rimedoĵ, telefono, telegramoj, faksoj, sufiĉe kontentige funkciis!

Pri la kialo de tiu lastmomenta decido cirkulis informoj ne ĉiam tute ĝustaj. Kelkaj pensis pri malfavora ago kontraŭ Grésillon aŭ kontraŭ Esperanto. Iu japana amiko, informita per internacia reto pensis, ke la huliganoj, kiuj malkvietigis la unuan semajnon de la Monda Futbal-konkuro, kulpis! La vero estas, ke ĝis nun neniu fakto pruvas malfavorecon, nur, eble, tro striktan aplikon de la leĝo pri sekureco kontraŭ incendio. Meze de junio estis finitaj la laboroj postulataj en septembro 1997. Sed en marto 1998 pliaj postuloj aperis. Mankis tempo kaj mono por ilin plenumi. La komisiono kunveninta la 16-an de junio konsekvence malpermesis la malfermon de la kastelo. La sumo (400 000 fr.) jam elspezita estis ŝparita dum kelkaj jaroj por la necesa prizorgado de la konstruaĵoj kaj ankaŭ pliaj plikomfortigoj. La kaso nun

estas preskaŭ malplena, ĉar neniu enkasigo okazis dum la somero. Ĉu ni povos farigi kaj pagi la pliajn grandegajn laborojn postulatajn, antaŭ la venonta somero? Alia demando: kiuj estas pretaj gvidi staĝojn? Kultura programo, administrado, serĉado kaj respondeco pri la servistaro, proviantado? Ĉar Grésillon ĝis nun estis ankaŭ hotelo kaj restoracio.

DANKON AL ĈIUJ GEAMIKOJ? KIUJ SKRIBIS AŬ/KAJ DONACIS AŬ PROMESIS DONACI HELPO-SUMOJN. SPECIALA FONDUSO ESTIS KREITA. SENDU VIAN EVENTUALAN KONTRIBUON PER CEKO AŬ REKTE AL LA POSTKONTO 1485-39 P NANTES; LA EKSTERLANDANOJ SIN TURNU AL: UEA POR KONTO GRES-Y.

POR GRAVA MONDONACO IU SALONO DE LA KASTELO POVUS RICEVI LA NOMON DE LA DONACINTO. FARU VIAN PROPONON.

# ESPERANTO TRA LA MONDO

**EN MONTEPELLIER** - Oni antaŭvidas, ke inter 2500 kaj 3000 geesperantistoj, el kiuj ĉirkaŭ 700 francoj, estos en Montpellier

de la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto por la 83-a universala kongreso de esperanto. Por tiu evento UFE eldonis kvarkoloran afiŝon kun blankaĵo por loka informo. La konata kantisto Guy Béart ĉeestos la ceremonion de la centa datreveno de la Franca Esperanta Unuiĝo sabaton la 8-an de aŭgusto posttagmeze.

Speciala programo por la gejunuloj disvolviĝos dum la tuta semajno kun favoraj tarifoj. Sabaton 1-an de aŭgusto ekskurso kondukos la interesatajn kongresanojn al Aubais, je 35 kilometroj de Montpellier, okaze de la festo de la mondcivitanoj.

**EN BRUSELO** - Nun esperanto disponas pri domo en Bruselo. Temas pri pluretaĝa konstruaĵo aĉetita de esperantisto kaj en kiu troviĝas pluraj luontaj apartementoj kaj lokoj por kursejo, kunvenejo kaj biblioteko. Adreso: Brusela Esperanto centro, Bd. Leopold II 176, BE-1080 Bruselo, Belgio.

**EN KATHMANDU** - Estis kreita Esperanto Domo en la ĉefurbo de Nepalo kun la celo antaŭenigi la internacian lingvon en tiu lando. Se vi intencas viziti Nepalon rilatu kun Esperanto-Domo, P.O. box 3447, Kathmandu.

**EN ĈINIO** - Edukistoj, kiuj instruas esperanton deziras rilatigi siajn lernantojn kun lernejoj en kiuj oni instruas la lingvon al infanoj inter 9 kaj 16 jaroj. Skribu al s-ro Zhang Jiping, Gong Nong Dalu 16-1, 5678 Chuanhu-tai, CN-130021 Changchun, Ĉinio.

**EN LA KONSILIO DE EŬROPO** - Post tri jaroj da klopodoj, la Konsilio de Eŭropo akceptis propedeŭtikan projekton de UEA "Neighbour", kiel eksperimenton por plibonigi kaj rapidigi la komunikadon kaj faciligi la interkulturajn interŝanĝojn ambaŭflanke de Mediteraneo.

**ĈE LA VERDULOJ** - Se vi estas "verdulo" aliĝu al la Asocio de Verduloj Esperantistoj (AVE) skribante al la sekretario:

Manfred Westermayer, Kandelstrasse 62, D-79194 Gundelsfingen, Germanio. La membroj povas esti aŭ ne membroj de verda partio

**NOVAJ LIBROJ** - Aperis en Pekino la tria kaj lasta volumo de la plej populara klasika ĉina romano "Ruĝdoma Sonĝo" de Cao Xueqin en la traduko (1.893 paĝoj) de Xie Yuming. Aperis ankaŭ la tradukaĵoj de la kvaraktaj dramoj "Sunleviĝo" kaj "Fulmotondro" de Cao Yu.

Nova titolo en la serio de la literaturaj numeroj de "Franca Esperantisto": Tereza Desqueyroux de François Mauriac (trad. de G. Labasthe)

Lasttempe aperis "Principidino Mary" de Lermontov, "La unua amo" de Turĝenev, "La morto de Ivan Iljiĉ" de Tolstoj kaj du scienc-fikciaj romanoj de A. kaj B. Strugackij: "La fora Ĉielarko" kaj "la dua invado de marsanoj". Ankaŭ aperis: "la maŝino, kiu kriis", rakontoj pri strangaj fenomenoj, de dek unu konataj esperantaj verkistoj.

Ni memorigas al vi, se vi ŝatas la historiajn enigmojn, la erudiciajn libretojn de André Cherpillod, inter kiuj: "Atlantido", "Glozel kaj la prahistoria skribo", "Johana d'Arko, pucelino de Francio", "La mortotuko de Torino" kaj "L.L. Zamenhof: datoj, faktoj, lokoj" aŭ, en la franca lingvo, "Voyage au fil des mots". Tiuj libroj estas haveblaj ĉe nia Libro-Servo aŭ ĉe la aŭtoro, "La Blanchetière", 72320 Courgenard.

Havebla estas ankaŭ la traduko de la libro de Umberto Eco "La serĉado de la perfekta lingvo".

Sub redaktado de Reinhard Selten, "Kostoj de la eŭropa lingva nekomunikado", studoj pri la kostoj pro manko de eŭropa komuna lingvo.

Estis reeldonita "Cezaro" de Mirko Jelusiĉ, historia romano en la epokfara rimarkinda traduko de I. Rotkviĉ.

**LEGADO ESTAS NEPRE NECESA PLIAĴO POR LA STUDADO DE ESPERANTO.**

# APUD FONTEVRAUD

La urbeto Fontevraud situas ĉe renkont-punkto de tri regionoj: Anĵuo, Potevo kaj Tureno. En tiu urbeto staras unu el la plej belaj, majestaj abatejoj en Francio. La konstruado de la tutaĵo daŭris plurajn jarcentojn kaj la rezulto estas bela imponaĵo. La arkitekturo de kelkaj partoj estas netrovebla aliloke. Tiu abatejo estas nepre vizitinda.

Survoje al, aŭ de, Fontevraud ne preterententu aliajn lokojn de la proksima regiono, ĉefe sude de la riverego Loire. Veturu ĝis la valo de la rivero Thouët (Tue) je deko da kilometroj for de Fontevraud direkte al Montreuil-Bellay. Tie, nestanta sine de la Saumuraj plataĵoj, establiĝis la abatejo Asnières, kiu konservas mirindan pentritan kaj skulptitan dekoron. En la abatejo troviĝas la tombejoj de la tieaj grandsinjoroj. La urbeto Montreuil-Bellay superstaras la riveron. La kastelo estis konstruita dum la XI-a jarcento kaj aranĝita dum la XV-a jarcento laŭ renesanca stilo. Tiam, ankaŭ kanonika preĝejo staris tie. La fortreso estis konstruita sur loko antaŭe okupita de romiana opidumo; ĝi fakte defendis la limon de Anĵuo kontraŭ la akvitaniaj dukoj. La plej atentinda parto estas la kuirejo kun centra fajrejo. Alta tegmento trifaca kovras la piramidan fajrejon. Tiu piramido estas firmigita de kvar plankotraboj, kiuj elvenas el la fasada muro kaj perdiĝas en la kontraŭajn murojn kaj la du kapuĉojn. La tuto similas al la dufajreja kuirejo konstruigita samepoke de la portugala reĝo Alfonso V-a en sia palaco de Cintra.


Survoje al Saumur ni haltu por admiri la ruinojn de la majesta navo de la preĝejo S-ta Denis. La urbo Saumur konstruiĝis ĉirkaŭ fortreso. La alteco de la tofroko, 60 metrojn, kiu superrigardas al la riverego allogis, jam dum la 10-a jarcento la unuajn konstruantojn. Duon-fortreso, duon-loĝejo la kastelo de Saumur estis finkonstruita fine de la 15-a jarcento. Dum la 16a jarcento Saumur estas prospera protestanta ĉefurbo sed la nuligo de la Nantes-edikto perdiĝas al ĝi ĝian Protestantan Akademion kaj grandan parton el ĝia loĝantaro. En 1768 estis kreita en la urbo la regimento de la reĝaj karabenistoj, kiu nun estas la

Lernejo de la Kavalerianoj. La malnova urbo konservas memoraĵojn el la epoko de la reĝo Renato, kaj el la 1-a Imperio.

Apud Saumur, en Sta Florent vizitu la abatejon. Monaĥoj forpelitaj de la normandaj invadantoj fuĝis ĝis Anĵuo kie ili instaligis. En 1025 Foulques Nera bruligis la urbon kaj la fortreson en kiuj situis la abatejo La bruliginto poste rekonstruigis la abatejon 2 kilometrojn for de la urbo sur la bordo de la rivero Thouët. La cenobitoj de Sta Florent forte impulsis la tapet-faradon. Jam en 985 estis pluraj laborejoj en la monaĥejo, kie oni brodis ilustritajn tapetojn por la preĝejoj kaj la kasteloj.

Trans la Loire la kastelo de Boumois (XII-a jarcento) staras inter la riverego kaj la rivereto Authion. Pro tiu situo la ĉirkaŭfosaĵoj regule ricevis akvon. La bienposedantoj estis tre riĉaj ĉar ili posedis plurajn farmojn kaj enkasigis impostojn pri fiŝkaptado kaj lin- kaj kanabo-negocoj. Strukturo tiu kastelo similas tiun de Plessis Bourré, kun granda ĉefa loĝkonstruaĵo larĝe ricevanta la eksteran lumon.

La promenado tra la regiono povas daŭri ĉar ankaŭ vizitindaj estas Gennes (romiaj kaj merovidaj postrestaĵoj), Cunault (belega romanika preĝejo), Trèves (ĉefturo de la XV-a jarcento,) Turquant (trogloditaj loĝejoj) kaj Montsoreau, kie, laŭ Alexandre Dumas, vivis du famaj geamantoj, Diane de Meridor kaj Bussy d'Amboise.



Tie naskiĝis RABELAIS

# PRI LA CENTJARA FRANCA MOVADO

Ŝajne jam en 1888, Louis de Beaufront. (ĝustanome Louis Chevreux) ekvidis la unuan libreton de Zamenhof, tamen en 1889, la adresaro de Zamenhof registris nur 5 francojn. En 1892, de Beaufront esperantigis la grafon Chandon de Briailles, estro de la fama ĉampanvina firmao kaj la junan studenton René Lemaire; de tiam la unuaj adeptoj dissendis kaj aperigis en gazetoj artikolojn, kiuj siavice interesis novajn pionirojn: tiel en 1895, juna gimnaziano, Gabriel Chavet, fondis en Louhans la unuan francan grupon, la kvinan en la mondo. Gaston Moch redaktis artikolojn, kies argumentaro estis poste centfoje reutiligata.

En 1898 laŭ iniciativo de de Beaufront, naskiĝis en januaro la revuo "L'Espérantiste" kiu anoncis la fondon de Societo por la Disvastigo de Esperanto (france: SPPE), kies celo estis arigi ĉiujn interesojn, kiuj scipovis la francan lingvon. Samjare malfermiĝis en Grenoble la verŝajne unua publika kurso; tiaj kursoj rapide multobligis tra la lando, tiel ke SPPE devis krei ekzamenon, "Atesto pri Kapableco" por la instruantoj.

En 1900 fondiĝis la grupo de Parizo. La ekaktivigo de la brila matematikisto Carlo Bourlet signis novan tre esperigan etapon; dank'al siaj kontaktoj kaj influo, en 1901, li ricevis la permeson, ke la grupo de Parizo kunvenu en la prestiĝa universitato Sorbono, ke Touring Club de France ekinteresiĝu pri Esperanto organizante prelegojn kaj subvencianta la novajn grupojn, fine ke eldonejo Hachette starigu tutan esperantistan fakon.

En 1903 SPPE fariĝas SFPE. Tiu aldono de la vorto "franca" al la asocia titolo ebligis ke ĝi estu agnoskata de oficialaj instancoj kaj ricevu subtenojn. Tiu epoko signis en la movado triumfon de elitismo, de fanfaronado, de kulto de la persono de Zamenhof; abundis flagoj, verda koloro kaj himnoj. Ĝi estis ankaŭ tiu de la unuaj renkontiĝoj inter "samideanoj", laŭ la vorto ĵus popularigita de de Beaufront. La unua eksterlanda esperantisto vizitinta Francion estis la ruso A. Postnikov en 1899. Ŝekvis nur maloftaj aliaj renkontoj, ĝis invito de

britoj fare de la grupo de Le Havre en 1903 kaj ĉefe ĝis kunorganizo de prakongreseto fare de la urboj Kalezo kaj Dovero okaze de vetkurado de aŭtomobilaj boatoj. Jen malfermiĝis la vojo al la unua "Universala Kongreso" de Bulonjo-ĉe-Marŝo en 1905. Sekve de tiu kongreso fondiĝis kun sidejo en Parizo la Centra Oficejo, sidejo de la Lingva komitato (prez. Boirac) kaj de la Organiza Komitato por la sekvontaj kongresoj (prez. Generalo Sebert).

Tamen jam multiĝis la disputoj inter de Beaufront kaj Bourlet i.a. pri la kontrakto konsentita de Hachette, kaj inter Bourlet kaj Th. Cart, pro rivaleco inter iliaj du eldonejoj: Hachette (Bourlet), kun la "Kolekto aprobita de Zamenhof" kaj "La Revuo", kaj Presa Esperantista Societo (Th. Cart), kun la revuo "Lingvo Internacia" kaj apero de multaj tradukoj. La krizo de "Ido" orkestrita en 1908 de de Beaufront markis kulminon; konsekvence multaj propagandaj klopodoj estis fuŝitaj, kaj parto de la esperantistoj transiris al la skismo!

En 1908 Th. Cart reprenis la prezidantecon de SPPE post eksgo de de Beaufront; la revuo "Franca Esperantisto" fondiĝis dank'al F. Menu de Ménil. Tamen ne pro tio ĉesis la problemoj; male disputoj ekestis inter la grupoj de la nacia organizo, kiu konsistis el individuoj. Federacioj de grupoj ekaperis: burĝonja (1907), pariza, norda, provenca, centrokcidenta kaj rodana en 1908, kaj konkurencis SFPE. Tiu polemika klimato, kun senĉesaj personaj atakoj daŭris ĝis la kongreso en Lyon (1911) en kiu, dank'al kompromiso, la movado estis reunuecigita. M. Rollet de l'Isle iĝis prezidanto. Tamen financaj problemoj signis la malaperon aŭ kunfandiĝon de tri revuoj en la sola "La Movado" de E. Houbart. Malgraŭ tiaj disputoj, kiuj donis ne tre allogan aspekton al la movado, propagando kaj instruado de la lingvo bone disvolviĝis i.a. dank'al eksperimento en la lernejoj de Lille fare de F. Durieux (ek de 1908), al publika eksperimento de traduko organizita de la taggazeto "Excelsior" (1911), kiu pruvis la superecon de Esperanto, kiel pontlingvo, kaj al la iniciato de André Michelin, la fama industriisto, kiu financis konkurson inter la novaj eklernintoj de Esperanto (1912). Fine la franca movado diligente preparis la grandiozan Universalan Kongreson en Parizo, kies inaŭguro bedaŭrinde koincidis kun la militdeklaro.

Post forpaso de multaj agemuloj kaj perdo de iluzioj, la asocio estis restarigita en 1920. Ĉar la antaŭmilitaj eldonejoj

ĉesis, fondiĝis Esperantista Centra Librejo, kies kapitalo konsistis el malmultekostaj akcioj proponitaj al esperantistoj; ĝi celis provizi la movadon per la necesaj kurs-libroj kaj literaturaĵoj kaj eĉ eldoni novan serion de "Franca Esperantisto" dum du jaroj. Tiun periodon karakterizas vigla ekstera agado, kiu atingis la voĉdonon de pluraj deziresprimoj favoraj al enkonduko de Esperanto: i.a. tiuj de Komerca Ĉambro de Parizo, Akademio de Sciencoj, Ruĝa Kruco kaj Societo de la Nacioj. Tamen cirkulero de la tiama ministro pri nacia edukado, Léon Bérard, nuligis multajn klopodojn malpermesante instruadon de esperanto en la lernejoj!

Raymond Schwartz lanĉis en Parizo sian unuan regulan kabareton: "La Verda Kato". Dum sia mallonga prezidanteco, Daniel Equeym, prokuroro en Limoges, sukcesis atingi la nuligon de la cirkulero Bérard. Grava internacia kongreso de Radio, okazinta en Parizo en 1925, alprenis Esperanton kiel unu el siaj laborlingvoj dank'al doktoro P. Corret; la kongreso havis la taskon starigi internacian regularon por la uzo de radio en la mondo. Samdece Esperanto estis akceptita kiel lingvo taŭga por internaciaj telegrafaj interrilatoj.

De 1926 ĝis 1940 gvidis la asocion Ernest Archdeacon. Tiu prestiĝa pioniro de aŭtomobilo kaj aviado kondukis SFPE al brila periodo de sia historio. La asocio serene reorganiziĝis; naskiĝis multaj fakaj asocioj. La tiamaj polemikoj celis la organizon de UEA kaj la francaj gvidantoj ludis gravan rolon en la skismo UEA-IEL en 1936. Generalo Bastien iĝis prezidanto ĝis la kunfandiĝo de ambaŭ internaciaj asocioj post la milito. SFPE inaŭguris en 1936 propran sidejon, kie deĵoris konstanta sekretario Yvonne Paulier. Pierre Petit estis administra sekretario de la asocio. Ekde 1933 reaperis "Franca Esperantisto"; de tiam la revuo regule aperas kiel oficiala organo de la asocio, kun nura interrompo dum la milito. Ĝi iĝis pli ampleksa kaj kun varia interesa enhavo.

Pluraj ministroj montris favoran sintenon al Esperanto; cirkulero de Jean Zay (1938) donis novajn eblecojn instrui la lingvon en lernejoj; doganistoj, poŝtistoj kaj fervojistoj ricevis le permeson surporti la insignon dum deĵorado. Propagandaj broŝuroj estis aĉeteblaj en stacidomoj kaj kioskoj, grandaj komercaj foiroj (Parizo, Lyon) utiligis grandskale Esperanton en sia

reklamado: tie la internacia lingvo eĉ estis pli utiligata ol la germana kaj la angla!

Cseh-kursoj furoris tra la lando; Lidia Zamenhof instruis al 100 ĝis 200 persona lernantaro. La lerneĵaj kursoj multnombriĝis; tiuj de la regiono de Besançon apoteozis per eksperimento kontrolita de la ministerio; ĝi pruvis ke gimnazianoj povas pratike uzi la lingvon kun eksterlandanoj nur post kelkaj monatoj da studado! Radio-elsendoj aŭdeblis en diversaj urboj, sed la plej prestiĝa estis la 45-minuta ĉiusemajna teatra programo en Esperanto, (ekde 1938) en kiu aktorin la "Esperantista Artistaro de Parizo" estrita de la aktoro Marc Darnault, kaj kiu vekis multan intereson kaj flanke de la aŭskultantaro kaj flanke de la tradukistoj kaj verkistoj, kiuj senĉese devis provizi abundan materialon por la programo. La sama Radio Paris PTT dissendis pli ol 500 kursojn de Célestin Rousseau; oni taksas je 70000 la nombro de interesitaj aŭskultantoj.

Sur la internacia plano, SFPĖ organizis universalan kongreson en Parizo en 1932, konferencon "Esperanto en la Moderna Vivo" en 1937, kiu ricevis grandan oficialan atenton, kaj planis novan universalan kongreson en Marsejlo en 1940, kiu ne okazis pro la militdeklaro.

La tiamaj estraranoj kuraĝe, sekrete, daŭre kunvenis dum la nazia okupacio. En 1945, krom SAT-Amikaro, ĉiuj antaŭaj asocioj (inkluzive de SFPE) malfondiĝis por reaperi en nova unuiĝo: Unuiĝo Esperantista de Francio kaj Kolonioj, kiu grupigis regionajn kaj fakajn federaciojn. Baldaŭ malaperis el la titolo la indiko "kaj kolonioj" kaj en 1962 la nomo ŝanĝiĝis al UFE (Unuiĝo Franca por Esperanto) por eviti la finaĵon "ista", kiu aperis al kelkaj tro sekteca. La nova asocio ne ĉiam evitis la konfliktojn, kiuj subfosas periode la movadon; tamen de post la sekvoj de la UEA-krizo de 1974, la laboro okazas en pli sana kaj kunlabora etoso. Kompreneble dum tiu longa, pli ol kvindekjara periodo, diversaj prezidantoj sin sekvis: J. Couteaux (1944), P. Petit (1946), G. Warnier (1948), H. Philippe (1951), R. Llech-Walter (1957), A. Albault (1967), J. Guillaume (1974), H. Gonin (1975), J.L. Texier (1979), R. Triolle (1985) kaj C. Nourmont (ekde 1994).

Sine de la movado, la grandaj datoj estis 1952, kun la aĉeto de la kastelo Grésillon fare de la francaj instruistoj, kiuj formis kooperativon; 1973, kiam UFE aĉetis

propran sidejon rue de la Cerisaie, kiun ĝi pligrandigis poste per aĉeto de apuda loĝejo; 1977, jaro de la IJK en Poitiers, en kiu kreiĝis la revuo "La Kancerkliniko", la teatro-trupo TESPА kaj la muzeo en Gray; 1986, fondiĝo de la esperantologia centro La Kvinnpetalo, en Bouresse. Eĉ se la antaŭmilita revo pri la rolo de Esperanto suferis en la ĝenerala publiko seniluziigo, UFE ne duondormetis kaj la bilanco de la atingoj restas tre pozitiva.

UFE prezentis Esperanton en Nacia Pedagogia Muzeo kaj dum skolta ĵamboreo (1947), partoprenigis Esperanton kiel duan laborlingvon dum internacia konferenco de Popoluniversitatoj (1957) dank'al P. Petit, ekspoziciis en Nacia Pedagogia Instituto (1966). UFE-komisiono zorgis pri unuaj kontaktoj kun Unesko (1952), kiuj kondukis al la fama rezolucio de Montevideo kaj poste konstante aktive ĉeestis la kunvenojn de Unesko, eĉ kunorganizante seminariojn kadre de la "konsultaj rilatoj", kontaktis la eŭropan konsilantaron akirante en 1985 "konsultajn rilatojn" por UEA, regule laboris por ke deputitoj deponu leĝproponojn pri instruado de Esperanto en la franca parlarmentejo. Indas ankaŭ mencii, kvankam UFE ne estis la sola instiganto: la studtagon pri Esperanto ĉe universitato Paris VIII (1983), la kursojn de Humberto Eco ĉe la prestiĝa Collège de France (1993), la aperon de priesperantaj libroj en komercaj eldonejoj kaj ĝenerala distribusistemo: kursoj de Assimil kaj Marabout-Flash (J. Thierry), vorttrezoro ĉe Ophrys (Duc-Goninaz), prezento de Esperanto en kolekto Que sais-je? (P. Janton) kaj pli aktuale "Le Déficit des Langues" (C. Piron 1994) kaj "L'Homme qui a défié Babel" (Centassi-Masson 1995). UFE dediĉis grandan atenton por enkonduki de Esperanto en la lernejojn. Senlace R. Llech-Walter, P. Petit kaj A. Ribot rondiris tra Francio kaj prelegadis, tiel tuŝante meznombre 10000 gelnantojn ĉiujare inter 1958 kaj 1965. Multaj kursoj malfermiĝis, ankaŭ en porinstruistaj lernejoj, tamen post reformoj en la edukistemo komence de la 70-aj jaroj, la nedevigaj kursoj rapide disfalis, kion iomete kompensis la malfermo de kursoj en du universitatoj: Clermont-Ferrand (P. Janton) kaj Aix-en Provence (M. Duc-Goninaz).

Dank'al nova entuziasmo kaj komercaj konceptoj de J.L. Texier kreiĝis la Klubo '87 en 1981; la alporto de novaj financaj rimedoj ebligis mobilizon de francaj fortoj

en inform-kampanjoj, regulan partoprenon ekde 1987 en Expolangues (granda rendevuo de ĉio koncernanta la lingvojn) renovigon de la tuta instrumaterialo, novajn rimedojn por la revuo "Franca Esperantisto" nun presita de Grafika Centro kaj ententanta literaturajn suplementojn (okazo por tradukistoj konigi la francan literaturon al eksterlanda publiko), organizon de teatra kaj kanzona festivalo en Parizo (ekde 1983), renaskiĝon de eldona fako ekde 1993 (Grand Dictionnaire Français-Esperanto, "La maljunulino, kiu paŝis en la maro"... Tiuj iniciatoj estis rekompencitaj de haltigo de la ĝenerala malkresko de la movado kaj kronitaj en 1985 de pokalo Fayne de UEA, kiu honorigas la plej vigan landan asocion. Pluraj francaj verkistoj publikigis abundan verkaron: Schwartz, Waringhien, Lorjak, Elgo, Cherpillod, k.a.; tradukistoj ne malpli kreis: R. Bernard, Le Puil kaj la skipo de tradukantoj de la "Antologieto" de Franca Esperantisto". Salutindas ankaŭ realigaĵoj de TESPА, bildstrioj pri Asteriks kaj Tinĉjo, kasedoj kaj diskoj de Le Puil, revuo "Rok'Gazet" kaj firmao Vinilkosmo.

Kaj ĉu necesas citi la organizon de Universalaj Kongresoj en Parizo (1950), Marsejlo (1957) kaj ĉijare en Montpellier? Batalemaj kaj polemikemaj kiel la gaŭlaj vilaĝanoj de Asteriks, la francaj esperantistoj ĉiam sciis unuigi siajn fortojn, kiam prezentigis favora okazo por Esperanto, kaj spite la malfacilaĵojn neniam submetiĝis eĉ al la plej haosaj cirkonstancoj. Ni esperu por la estonteco kaj rendevuu por la venonta ducentjarigo!

Hervé GONIN



Cart Théophile

# SUDMARAJ INSULOJ

*-La flosilo Kon-Tiki, post trimonata veturado, finfine atingas la Tuamotuarkipelagon-*

En la nokto antaŭ la 30-a de julio estis nova kaj stranga atmosfero ĉirkaŭ Kon-Tiki. Eble estis la surdiga tumulto de ĉiuj marbirdoj super ni, kiu montris, ke io nova estas okazonta. La multvoĉa birdokriado ŝajnis ekscitita kaj terligita post la mortaj krioj de senvivaj ŝnuroj, kiujn dum la lastaj tri monatoj ni aŭdis tra la muĝo de la maro. Kaj la luno ŝajnis neordinare granda kaj ronda, dum ĝi ĉirkaŭdancis super la deĵoranto en la mastopinto. En nia imago ĝi reflektis palmojn kaj varmsangan romantikon. Ĝi lumis ne tiel flava super la malvarmaj fiŝoj en marvasto. Je la 6-a horo Bengt venis de la mastopinto kaj kuŝiĝis, vekinte Herman. Kiam Herman grimpis supren laŭ la knaranta balanciĝanta masto, komencis heliĝi por la nova tago. Dek minutojn poste li denove iris malsupren laŭ la ŝnurŝtuparo kaj skuis miajn piedojn. "Nun vi devas elveni por rigardi vian insulon!"

Lia vizaĝo brilis kaj mi rapidis supren sekvata de Bengt, kiu ankoraŭ ne tute endormiĝis. Ni amasiĝis kiel eble plej alte en la masto. Estis multaj birdoj ĉirkaŭ ni, kaj maldensa violblua vualo sur la ĉielo speguliĝis en la maro, kiel la lasta restaĵo de la cedanta nokta mallumo. Sed la tuta horizonto oriente estis ricevinta ruĝetan brilon, kiu disvastiĝis, kaj sudoriente ĝi iom post iom pretiĝis sangruĝan fonon por eta ombro simila al blua krajonstrio sur peco de la horizonto. Tero! Insulo! Ni avidiglutis ĝin per la okuloj kaj vekis la aliajn, kiuj dormpezaj elvenis rigardante ĉiudirekten kvazaŭ ili atendus, ke la pruo, en la venonta momento, puŝiĝos kontraŭ bordon. Ponto el kriantaj marbirdoj etendis sin trans la ĉielon rekte al la malproksima insulo, kiu pli bone vidiĝis, kiam la ruĝa fono plilarĝiĝis kaj iĝis oro, dum la suno proksimiĝis kun la taglumo.

Nia unua penso estis, ke la insulo troviĝas ne tie, kie ĝi estu. Kaj ĉar la insulo ne povus esti drivinta, la flosido en la nokto estis kaptita de nordorienta fluo. Unu rigardo sur la maron kaj la direkto de la ondoj diris al ni, ke, dum la mallumo, ni perdis ĉiujn ŝancojn. Tie, kie ni nun estis, la vento ne plu permesis al ni direkti la

flosidon kontraŭ la insulon. La regiono ĉirkaŭ la arkipelago estis plena de fortaj, lokaj marfluoj, kiuj puŝiĝis kontraŭ la bordojn kaj serpentumis en ĉiuj direktoj... Ni turnis la direktilon, sed ni bone sciis, ke tio estas vana. ... Laŭ la pozicideterminoj de Erik, ĉi tio estis Puka-Puka, la plej antaŭa insulo en la Tuamotu-grupo.

Gojeksplodoj ne okazis. Post kiam ni turnis la velon kaj reŝanĝis la direktilon, ni pendis silentaj en la mastopinto aŭ staris sur la ferdeko, rigardante la teron, kiu subite aperis ĉe la horizonto, meze sur la senfina, solpotenca maro. Fine ni ricevis videblan pruvon, ke ni vere moviĝis dum ĉi tiuj monatoj, ni ne kuŝis flosantaj en la centro de la sama eterna, ronda horizonto. Ni ĉiuj pleniĝis de varma kaj trankvila kontento pro tio, ke ni atingis Polinezion, miksitajn kun momenta malkontento pro tio, ke ni senpove devas vidi la insulon, kiel fatamorganon dum ni mem daŭrigas nian eternan drivadon okcidenten trans la maro.

Tuj post la sunleviĝo dika, nigra fumkolono altiĝis super la arboj maldekstre de la mezo de la insulo. Ni sekvis ĝin per la okuloj kaj pensis, ke nun la indiĝenoj ellitiĝas kaj preparas la matenmanĝon. Tiam ni tute ne sciis, ke indiĝenaj observantoj vidis nin kaj sendas fumsignalojn por inviti nin al la insulo. Je la sepa malfortaodoro de bruligita palmigno tiklis niajn salajn naztruojn. Tio vekis ĉe mi dormetantajn memorojn pri la brulŝtiparo sur la bordo de Fatuhiwa. Duonhoron poste ni flaris odoron de novhakita ligno kaj arbaro. La insulo nun komencis ŝrumpi, ĝi situis malantaŭ ni, kaj la vento puŝblovis ne-regule. Dum dek kvin minutoj Herman kaj mi pendis en la masto kaj lasis la varman odoron de folioj kaj verdaĵo filtriĝi tra niaj naztruoj. Tio ĉi estas Polinezio, belega, abundaodoro de seka tero post naŭdek tri salaj tagnoktoj inter la ondoj...

Je la oka kaj duono Puka-Puka malleviĝis en la maron malantaŭ ni, sed ĝis la deknua ni povis vidi de la mastopinto, ke estas eta blua strio super la horizonto oriente. Ankaŭ tiu malaperis, kaj alta kumulus-nimbus-nubo, kiu senmove staris alte sur la ĉielo, estis ĉio, kio sugestis, ke situas Puka-Puka. La birdoj malaperis. Ili sendube troviĝis sur la venta flanko de la insuloj, por ke ili havu la venton dorso, kiam vespere ili flugas hejmen kun plenaj stomakoj. Ankaŭ la korifenoj malmultiĝis.

Tiun nokton Bengt diris, ke li sopiras al tablo kaj seĝo, ĉar estas malkomforte turni sin de dorso al ventro dum la legado. Cetere li ĝojis, ke ni maltrafis la teron, ĉar li havis ankoraŭ tri nelegitajn librojn. Torstein subite deziris pomon, kaj mi mem vekigis nokte, ĉar mi flaris farĉan bifestekon kun bulboj. Sed estis nur malpura ĉemizo.

Jam la postan antaŭtagmezon ni ekvidis du novajn nubojn, kiuj leviĝis kvazaŭ vaporo de du lokomotivoj malantaŭ la horizonto. La karto rakontis al ni, ke la nomoj de la koralinsuloj, de kiu ili venis, estas Fangahina kaj Angatau. La nubo super Angatau estis plej konvena por ni laŭ la vento kaj ni tial direktiĝis al ĝi firmigis la direktilon kaj ĝuis la mirindan kvieton kaj liberecon de Pacifiko...Dum tri tagnoktoj ni direktiĝis laŭ la nubo super Angatau, la vetero estis brila, la direktilo mem tenis la direkton, kaj la fluo ne ĝenis nin. La kvaran matenon Torstein anstataŭis Herman post la deĵoro kaj Herman diris, ke li opinias, ke li en la lunlumo vidis la konturojn de malalta insulo. Kiam la suno tuj poste aperis, Torstein ŝovis la kapon tra la kajutpordo kaj kriis: "Tero antaŭ ni!" Ni ĉiuj kuris sur la ferdekon, kaj tio, kion ni vidis, igis nin hisi ĉiujn flagojn. Unue la norvegan en la poŭpo, poste la francan en la pinto, ĉar ni estis survoje al franca kolonio. Baldaŭ la tuta flagaro de la floslo flirtis en la vigla trado. Kaj nun Kon-Tiki vere estis ornamita por festo...Dum la suno iom post iom altiĝis sur la ĉielo malantaŭ ni, ni bone ekvidis verdan lumajon alte super la insulo. Estis rebrilo de la kvieti, malprofunda laguno interne de la ringrifo. Kelkaj el la malaltaj atoloj ĵetas tian rebrilon milojn da metroj alten, kaj tiel ili malkaŝas sian pozicion al primitivaj maristoj multajn tagojn antaŭ ol la insulo mem estas videbla super la horizonto. Je la deka ni komencis mem manovri la direktilon, ĉar nun ni devis decidi, al kiu parto de la insulo ni direktu la floson. Ni povis jam distingi unuopajn arbosuprojn kaj videtis vicojn de sunbrunaj arbotrunkoj, kiuj elstaris kontraŭ la fono de densa, ombroplena foliaro.

Ni sciis, ke iuloke inter ni kaj la insulo embuskas danĝera subakva rifo kaj minacas ĉion, kio venas drivante al la virga insulo. Tiu rifo haltigas la liberan ruliĝon de la ondegoj de oriente, kaj kiam la grandegaj akvoamasoj perdis la ekvilibron super la malprofundaĵo, ili kun ŝaŭmo kaj tondro ŝanceliĝis kaj falis sur la akran koralrifon.

Multaj ŝipoj estis kaptitaj de tiu sovaĝa akvofluo kontraŭ la subakvaj rifoj en la Tuamotu-grupo, kie ili tute dispeciĝis kontraŭ la koraloj. De la maro ni ne vidis tiun embuskan kaptilon. Ni proksimiĝis laŭ la ondodirekto, kaj vidis sur la kurban, blankan dorson de ondo post ondo, kiuj malaperis en direkto al la insulo. La ringrifo kaj la tuta ŝaŭmanta sorĉkaldrono super ĝi estis kaŝitaj de larĝaj ondodorsoj antaŭ ni. Sed ekster ambaŭ ekstremoj de la insulo, kie ni vidis la bordon profile, norde kaj sude, tie ni vidis, ke la maro bolas en blanka ŝaŭmo kaj ĵetas sin alten nur kelkcent metrojn de la bordo.

Ni metis la direkton tiel, ke ĝi tuŝis la eksteran flankon de la sorĉbolaĵo, antaŭ la suda pinto de la insulo, kaj esperis, ke veninte tien ni povos direkti la floson laŭlonge de la ringrifo, ĝis ni atingos aŭ la malventan flankon aŭ ĉiukaze tiel malprofundan lokon, ke ni per improvizita ankrō povos haltigi la drivadon. Poste ni intencis tie atendi, ĝis la vento turniĝos, tiel ke ni mem estos sur la malventa flanko...

Kiam ni proksimiĝis, ni aŭdis la muĝon de la ondfrakasoj kvazaŭ kontinua akvofalo kontraŭ la rifo antaŭ ni, kaj baldaŭ ĝi sonis kiel senfina ekspresvagonaro, kiu rapidas preter ni kelkcent metrojn de nia dekstra flanko... Du viroj samtempe manovris la direktilon. Ili staris malantaŭ la kajuto kaj ne povis vidi ion ajn antaŭe. Nia intenco estis teni nin kiel eble plej proksime al la danĝera rifo. De la mastopinto ni daŭre observis por trovi fendon aŭ malfermaĵon en la rifo, tra kiu ni povus traŭrigi la floson. La nefirmaj drivtabuloj permesis al ni direkti je proksimume dudekgrada angulo ambaŭflanke de la ventodirekto, kaj la vento estis laŭlonge de la rifo. Dum Erik gvidis la veladon zigzage kaj proksimiĝis al la rifo tiom kiom estis konsilinde pro la akvosuĉo, Herman kaj mi eniris la boaton kaj fiksis ĝin per ŝnuro al la floslo. Kiam la floslo proksimiĝis al la rifo ni sekvis en la boato kaj venis tiom proksimen al la tondranta rifo, ke ni ekvidetis la vitroverdan akvomuron, kiu ruliĝis for de ni, kaj kiam la ondoj estis resuĉataj la nuda rifo malkovriĝis kaj similis al barikado el rusta ferŝtono. Tiom malproksime, kiom ni povis vidi troviĝis nek fendo nek trapasejo. Erik ree turnis la velon per streĉo de la malddekstra ŝnuro kaj malstreĉo de la dekstra, kaj la direktantoj faris la samon per la

direktilo, tiel ke Kon-Tiki turnis la pruo eksteren kaj velis for de la danĝera zono ĝis la venonta proksimiĝo.... La tutan tempon ni drivis laŭlonge de la insulo, tiel proksime, ke ni vidis ĉiujn detalojn sur ĝi, kaj tamen la paradiza beleco tie estis al ni nealirebla pro la ŝaŭmanta rempar-fosaĵo, kiu kuŝis intere.

Je la tria horo la palmarbaro malfermiĝis, kaj tra larĝa aperturo ni vidis rekte al blua kaj spegulbrila laguno. Sed la ringorifo kuŝis same kompakta kaj montris siajn sangoruĝajn dentojn en malbonaŭgura ŝaŭmo. Estis neniu trairejo..., kaj la palmarbaro ofte ree malfermiĝis kaj donis al ni ekvidon al la interno de la koralinsulo, kiu konsistis el la plej bela, plej klara salakva laguno, kuŝanta tie kiel granda kaj trankvila lageto ĉirkaŭita de balanciĝantaj kokospalmoj kaj helaj sablobordoj. La rava verda palminsulo mem formis larĝan, molan sabloringon ĉirkaŭ la gastema laguno, kaj kvazaŭ alia ringo ekster la tuta insulo kuŝis la ruŝuĝa glavo, kiu gardis la pordojn de la paradizo...

Je la kvina kaj duono ni denove velis kontraŭ la rifo; nun ni proksimiĝis al la okcidenta ekstremo de la insulo, kaj devis fari la lastan superrigardon, esperante trovi trapasejon. La suno staris tiel malalte, ke ĝi blindigis rigardon antaŭen, sed ni vidis, ke malgranda ĉielarko staras en la aero tie, kie la maro rompiĝas kontraŭ la rifo ekster la lasta pinto de la insulo. Nun ĝi kuŝis kiel silueto antaŭ ni. Sur la bordo ni ekvidis kelkajn senmovajn, nigrajn makulojn en grupo. Subite unu el ili malrapide moviĝis al la akvo, dum pluraj al la aliaj malaperis rapidege kontraŭ la arbarrando. Estis homoj! Ni direktis la floson tiel proksimen al la rifo, kiel ni kuraĝis; la vento malfortiĝis, kaj ni opiniis, ke ni baldaŭ atingos la malventan flankon de la insulo. Nun ni vidis, ke oni metas kanoton sur la akvon, kaj du personoj saltis en ĝin kaj komencis padeli sur la alia flanko de la rifo. Iom pli malproksime ili turnis la kanoton eksteren, kaj ni vidis ĝin leviĝi alten kun la ondoj, kiam ĝi trairis la pasejon en la rifo kaj venis rekte kontraŭ ni.

Tie do estas la malfermaĵo en la rifo, tie estas nia sola espero. Nun ni ankaŭ ekvidis la tutan vilaĝon, kiu situis inter la palmtrunkoj. Sed la ombroj jam komencis longiĝi. La du en la kanoto svingis la brakojn. Ni fervore resalutis, kaj pligrandigis la rapidecon. Estis polinezia kanoto kun

flankflosilo, kaj du brunaj personoj en subĉemizoj sidis padelante kun la vizaĝoj antaŭen. Jen venos novaj lingvomalfacilaĵoj! Mi estis la sola sur la flosilo, kiu memoris kelkajn marquesajn vortojn de mia restado sur Fatuhiva, sed pro manko de praktikado de la polinezia lingvo en niaj nordaj landoj, oni facile forgesas ĝin. Tial ni ekĝojis, kiam la kanoto atingis la floson, kaj la du sursaltis ĝin, ĉar unu el ili ridegis etendante brunan manon, dum li diris angle: "Good night!" – "Good night", mi mirigite respondis. "Ĉu vi parolas angle?". La viro kapesis. "Good night", li diris. "Good night." Tio estis la tuta vortprovizo de fremdaj lingvoj, kaj per tio li multe imponis al sia pli modesta amiko, kiu nun staris malantaŭe kaj ridante admiris sian spertan kamaradon. "Angatau?" mi demandis kaj montris la insulon. "H'angatau", la viro konsente kapesis. Erik iĝis fiera. Li pravis, ni estis tie, kie la suno diris al li, ke ni estas... La sentoj atingis kulminon. Naŭdek sep tagnoktoj. Jen en Polinezio. La indiĝenoj ĝojegis kaj kriadis. Hodiaŭ vespere estos festo en la vilaĝo.



*La tri sinsekvaj artikoloj pri la transpacifika flosado estis eltiritaj el la verko de Thor Heyerdahl "KON-TIKI EKSPEDISJONEN" tradukita de Carsten Brynildsen (1951). Ni esperas, ke la legado de tiuj tri artikoloj instigos vin legi la tuton de tiu interesege aventur-rakonto.*

## Laborpunito fariĝas poliestro

### VIDOCQ

*(La 19-a jarcento naskis abundon da eksterordinaraj homoj. La plej stranga el ĉiuj estas sendube Vidocq (vidok). Rakonto pri lia vivo estas pli pasiga ol ĉiu imagita policromano. Naskiĝinta en honesta metiista familio, li fariĝis laŭvice, forfuĝinta laborpunito, heroo soldato de la 1-a franca respubliko, skermomajstro, oficiro, kolportisto, kaperisto, kontrabandisto, komercisto, tajloro, estro de la ŝtata polico, privata detektivo. Jen skizo de lia aventuroplena vivo.)*

Dum la nokto de la 23-a de julio 1775, en Arras, urbo de norda Francio, naskiĝis filo en la hejmo de iu panfaristo nomita Vidocq. Ĉar tiam potenca fulmotondro kun intensa pluvego skuadis la urbon, la akuŝistino asertis, ke tio estas signo, ke la ĵus naskita Francisko havos vivon plenan de agitado. La antaŭdiro realiĝis ĝis grado tute ne konceptebla. La knabo estis altstatura, korpe lerta kaj pli ol ordinare fortika. Li ankaŭ estis inteligenta, eĉ malica kaj tre batalema. Li rapide akiris superecon super siaj samaĝuloj, sed ankaŭ famon kiel "knabaĉo".

Lia patro instruis al li sian metion. Kompreneble li devis ankaŭ liveri panon al la klientaro. Dum siaj vagadoj tra la urbo, li konatiĝis kun senlaboraj kaj diboĉaj junuloj. Fine estanta deksep-jara, li rompis la monkason de la patro, ŝtelis la monon, kaj forfuĝis ĝis la haveno Calais. Li intencis enŝipiĝi tie kaj veturi ĝis Ameriko. Sed tie, li estis siavice priŝtelita. Senmona, senŝirma, malsata, pentema, li decidis reiri hejmen kaj peti pardonon de la gepatroj. Por vivteni sin, kaj akiri la vojaĝrimedojn, li dungigis ĉe iu foiristo, kies trupo konsistas el unu pajaco, unu akrobato kaj kelkaj simioj. En tiu ofico, li ricevis pli da batoj ol da pano. Sed li eklernis kelkajn akrobataĵojn, jonglaĵojn kaj iom el la ŝminkarto. Tiuj konoj estis poste tre utilaj.

Lacigita de la malbona traktado de la mastro, li forkuras. feliĉe li trovas ĉarlatanon, kiu bezonas helpanton por porti liajn pakajojn. Plie la vagado de tiu ĉi individuo proksimigos lin al Arras. Senhezite, la

junulo akceptas la proponon. Tiel, post peniga vojirado kun multaj malagrablaĵoj, Vidocq revenas en la naskiĝurbon. Ne tre facile li ricevas pardonon de la gepatroj kaj eklaboras en la familia panejo.

Ve! La bonaj decidoj de la juna Francisko ne longe daŭris. Post ne longe, li foriras kun iu aktorino. Kelkajn semajnojn poste la sireno trovas alian akompananton. Aplombe, Vidocq revenas en Arras kaj petas de sia patro permeson soldatiĝi. Tio estis la sola ebla solvo, ĉar la gepatroj ne plu povis fidi liajn promesojn pri pliboniĝo. Pro sia staturo kaj fortikeco li estas tuj akceptita, kvankam li ne estas jam dekok-jara. Ŝajne li ne montriĝis tre disciplinema, sed tre kverelema. Kio havigis al li punojn kaj duelojn. Tiuj ĉi estis ĝenerala favoraj al li, pro liaj skerma lerteco kaj fortikeco. Li ja estis kuraĝa kaj sentima. Li tion laŭdirinde pruvis dum la famaj bataloj de Valmy kaj Jemmapes. Li kredeble povus fariĝi oficiro se li ne estus vundita je unu kruro. Reveninte en Arras por resaniĝo, li trovas la urbon supremata de la sangavida Teroro tiam reganta. Tio ne malhelpas, ke li frekventas la tiean diboĉularon. Unu el liaj "amikinoj" trudas, ke li edziĝu je ŝi, ŝajnigante gravediĝon, kies respondecon li ne povas malakcepti. Lia permeso por resaniĝo finiĝas. Sed li ne reiras al sia regimento kaj forkuras en Belgion. Tie li spertas multajn aventurojn, ne ĉiuj honorigajn, pro kiuj li revenas en Francion. En Lille li estas arestita dum interbatalo pro virino. La polico eltrovas, ke li estas la dizertinto Vidocq kaj malliberigas lin por juĝo. Tiu okazaĵo devis decidi pri lia tuta estonta vivado, pro strangaj cirkonstancoj.

En la malliberejo Vidocq sukcesas ricevi apartan ĉambron. Iom senpripense, li konsentas, ke du aliaj malliberuloj, Grouard kaj Herbault uzu lian ĉambron por redakti peticion favore al alia arestito nomita Boitel. Efektive, tiu estis liberigita. Sed, oni konstatis, ke la liberiga ordono estas falsaĵo. Boitel, rearestita, asertas, ke la skribintoj estas Grouard kaj Herbault helpitaj de Vidocq. Spite al energiaj protestoj la junulo estas kulpigita pri "falsafaro de aŭtentikaj kaj publikaj dokumentoj". La afero estis grava kaj nedubeble finiĝos per laborpuno. Alivestite Vidocq sukcesas fuĝi kaj sin kaŝas en la urbo. Hazarde li estas rekonita kaj arestita. Sed lia afero grave plidangeriĝis. La "amikino", kiu havigis al li la oficiran kostumon

dank'al kiu li forkuris estis viktimo de murdoprovo. Pro diversaj koincidoj ŝiar amiko estas kulpigita pri ĝi. Malesperiga situacio! Vidocq skribis en siaj memoraĵoj: "Dudekkvar-jara, mi trovis min, sub la ŝarĝo de duobla akuzo pri falsado kaj murdo, ne estanta kulpita pri iu ajn el tiuj du krimoj". Mallibereco kaj estonta laborpuno estas netolereblaj por la junulo. Aŭdace li denove sukcesas forkuri ĝis Ostendo, de kie li povos forveturi en Amerikon. Tiu espero malsukcesas.

Post nelonge li estas senmona, sen legitimaj paperoj kaj senlabora. Por savi sian vivon li trovas rimedon nur per dungigo en bando de kontrabandistoj. La metio ne plaĉas al li. Tial, tuj kiam li havas sufiĉe da mono li reiras al Lille. Sed dumvoje li estas renkontita de du ĝendarmoj, unu fojon pli arestita kaj enkarcerata en Douai. Kun aliaj malliberuloj, dum dumonata peniga laboro, ili traboras pasejon tra la muro de la malliberejo. Unu el ili kaŝis en sian anuson ujeton entenantan segiletojn. Ili do povis rompi la katenojn ilin ligantajn. Nun libera Vidocq sukcesas dungiĝi en la armeo, ne kiel soldato, sed kiel helpa flegisto por la ĉevaloj. Malfeliĉe li estas rekonata kaj denove arestita. Kaj li revenas en la malliberejon de Douai. Tie alia provo de fuĝo malsukcesis. Fine li estis juĝita kaj kondamnita je ok jaroj da punlaboro. Pluraj provoj de forfuĝo malsukcesis. Post kelkaj monatoj li estis kondukita al Bicêtre, proksime al Parizo, kie li estos alligata al la ĉeno de la kondamnitoj irontaj al la punlaborejo de Brest. La viroj, parigitaj laŭ sia staturo estas kunkatenitaj al dumetra kateno. Ĉe unu piedo oni nitas ferbulon pezantan pli ol unu kilogramo. Ĉiu punito estas ligita al la "ĉeno" per "kravato". Vidocq ĝin tiel priskribas: "speco de fera triangulo malfermebla je unu flanko per bolto-ĉarniro, kaj je la alia flanko per najlo fridmartelita". Tiu "kravato" estis metita ĉirkaŭ la kolo de la "ĉenano" kaj la najlo estis nitita per martelo. Danĝera faro, ĉar la peza martelo svingiĝas tute proksime al la kapo, kiun subita movo povas frakasi. La punitoj estis tiel katenitaj laŭ unu "ĉenero" de 26 kondamnitoj, kiuj ne plu povis sinmovi aparte. Post dudek kvar tagoj da marŝado, la "ceno" alvenis en Brest.

Post kelka tempo, Vidocq sukcesas fuĝi el la laborpunejo, vestite per ŝtelita kostumo de monaĥino.. Dank'al tiu

fid-inspira vesto, li povas iri ĝis Nantes. Tie, li retrovas konatulojn. Li ricevas helpojn de ili, iom da mono kaj novajn vestojn. Certe ne pro kompato; ĉar ili proponas al li partoprenon en ŝtelo de riĉa domo. Li ne rifuzas, sed tuj forkuras, intencante iri ĝis Arras por revidi sian patrinon.

Bonvena ŝanco ebligas dungon ĉe brutovendisto, kiu konfidas al li kondukon de grego de bovoj ĝis Parizo. Vidocq fariĝis modela bovkondukisto, kaj enspezis sufiĉe grandan sumon. Li tiam iras al Arras. Sed la urbo estas danĝera restadejo por li. Foririnte, li estas gasto de vilaĝa pastro kaj instruas al geknaboj la rudimentojn pri lego, skribo kaj kateĥismo. Tio ne povas daŭri. Pro ia amaventuro, li estas devigata forkuri. Li ankoraŭ iras al Belgio. Post diversaj aventuroj, li alvenas en Roterdamo. Tie li estas perfide kaj perforte "rekrutita", kiel maristo sur nederlanda kaperista ŝipo. Dum halto de la ŝipo en Ostendo, li estas rekonita kaj kaptita. Kelkajn monatojn poste li estas alkatena al la "ĉeno" de kondamnitoj por la punlaborejo de Toulon. Tien la "ĉeno" alvenis post plurmonata, plejparte pieda, vojaĝo.

Tuj je sia alveno, Vidocq havis nur unu penson: forfuĝi. Malfacila afero ĉar kompreneble, li estas konsiderata danĝera ulo, jam fuĝinta, kaj li estis tre severe prigardata. Prepari forfuĝon for de la laborpunejo necesigas ferecan volon kaj longan paciencon. Li posedis ambaŭ ecojn. Lia unua zorgo estis mildigi la malfidon de la voktoj. Li do havis imitindan kaj neriproĉeblan konduton. Post kelka tempo li petis permeson fabriki ludilojn el lignaj pecetoj. Li ricevis konsenton, kaj li instalas veran laborejon kun aliaj kondamnitoj. La ludiloj, venditaj en la urbo, havigis al ili iom da mono. La gardado fariĝis malpli severa, ĉar punitoj okupataj per laboro ne povas pensi pri fuĝo....Iam Vidocq plendis pri kruraj doloroj. Tio ne estis malofte pro la peza ferbulo, kiun la punitoj devis konstante trenadi. Li iras al la hospitalo kaj tie kaptas la konfidon de la kuracisto. Iun tagon, dum tiu ĉi estis faranta operacion, Vidocq malligas sian katenon antaŭe segitan, prenas la redington, ĉapelon, bastonon kaj gantojn de la Hirurgo; li surmetas botojn, perukon, surgluas vangharojn, akcesorojn de longe preparitajn, kaj kviete eliras tra la ĉefpordo.. La soldatoj kredas lin doktoro kaj li facile alvenas sur la straton. Sed li ne

# FABELO

## LA DISTRA PROFESORO

F. SZILÁGYI

Ĉu estis, ĉu ne estis, eble trans la Fabelmaro estis tre-tre alta monto, sur la supro de la monto estis tre-tre bela kastelo, la beleaga kastelo havis tre-tre nigrajn kamentubojn. Sur unu el la grandegaj, nigraj kamentuboj sidis tre-tre eta birdo. Ĝi rakontis al mi la jenan, veran historion:

Ĉu estis, ĉu ne estis, eble trans la vitromontoj vivis granda kaj potenca princo. Li havis tre simpatian, junan kaj belan filon. La juna princido fianĉiĝis kun la princidino de la najbara urbo. Tiu princidino estis la plej bela virino en la mondo. Ŝiaj okuloj similis al nokto, ŝia vizaĝo lumis, kvazaŭ la suno, sur la vangetoj floris la ruĝeto de la printempo, sur la etaj lipoj flamis la somero, ŝia talio...hm!...ŝia talio estis la plej bela sur la mondo, sed...sed... sed la princido tamen kuraĝis diri al sia patro, al la potenca princo: "Kara Paĉja Moŝto, mi vere estas kortuŝite dankema pri Via moŝta propono pri edziĝo, sed la noktokula princidino...tiel ŝajnis al mi... ŝi havas monteton sur sia neĝblanka dorso... Mi pensas, ke oni nomas tion ĝibo. La patro majeste respondis: "Jes, mia kara. Estu trankvila, ŝi estas certe la plej bela en la tuta mondo. Vere ŝi havas... ŝi vere havas sveltan ĝibeton, sed ĝi eĉ altigas ŝian belecon. Krom tio ŝi havas riĉegan, belan kaj potencan patron. Vi estos havanto de la plej simpatia ĝibeto kaj la plej respektinda bopatro. Ĉu...,"

"Jes"! respondis simple la juna princido.

Do la juna princido fianĉiĝis kaj alvenis la feliĉa tago de la geedziĝa soleno. La tuta urbo febrigiĝis kaj la modrevuoj jam inaŭguris la sensacian novan modon: iom post iom la elegantaj sinjorinoj hontis sen ĝibo iri sur la straton, viziti la teatrojn, salonojn kaj amuzejojn.

Antaŭ semajnoj la granda kaj potenca princo kunvokis sian konsilantaron, kaj demandis kiamaniere oni povos memorindigi al la loĝantaro de la urbo la festan tagon de la geedziĝo. Fine oni konsentis, ke por la festo oni konstruos grandegajn cementbasenojn, en kiuj eĉos vino, biero, brando, ktp. kaj estis ankaŭ aparta lakto-

baseno, ĉar en la urbo ne mankis la alkoholkontraŭuloj.

La eta birdo tre multe rakontis al mi pri la ceremonioj, popolamuzoj, pri la beleco de la juna paro, pri la grandiozaj, ornamitaj ĝiboj de la sinjorinoj kaj inter aliaj ĝi rakontis al mi tre ridindan, interesan epizodon. Pro manko de loko mi nur tion fabelos al vi:

Vivis en tiu urbo tre stranga ekscentrikulo. Li estis profesoro, tre-tre distra homo. Li nek manĝis, nek trinkis, nek dormis, sed ĉiam cerbumis. Li faradis ĉiam nerealigebajn planojn, verkadis fantaziajn ellabora-aĵojn pri malbelaj temoj: malsanoj, mizeroj, ekonomia krizo, plibonigo de la ĝenerala situacio, intensigo de la produktado, senlaboreco, sed ĝenerale tre malmultaj interesiĝis pri la vanaj projektoj de la stranga profesoro. Sed la profesoro tamen plu cerbumis. Eĉ dum la granda festo li nur meditis la tutan tagon. Ĉirkaŭ li ĉiuj dancis, trinkis, diboĉis kaj la ebruloj iomete embarasis lian meditadon. Pro tio li decidis elekti alian vojdirekton. Fine li atingis la ĉirkaŭaĵon de la laktobaseno. Strange diri, sed laŭ la vortoj de la eta birdo la tuta popolo, de la suĉinfanoj ĝis la longbarbuloj svarmis ĉe la alkohobasenoj; kontraŭe ĉe la lakto estis neniu. La profesoro estis distrito kaj li ne rimarkis la forlasitan laktobaseno. Ĉu vi scias kio okazis? La malfeliĉa profesoro falis en la laktobaseno. Dum la unuaj momentoj eĉ li mem ne perceptis sian akcidenton kaj li eĉ en la lakto cerbumis pri la verŝajna bankroto de la mondo. Li estis pacienca kaj modesta homo kaj li observadis en la laktolago la kaŭzojn de la malsanoj ktp. sed fine la amase enfluanta lakto devigis lin kriigi: "Helpuuu! Helpuuu!" Post kelke da momentoj kuris tien de ĉie la homoj. Unu el ili volis tuj elsavi la distran profesoron, sed la alia, la fama juristo, sinjoro d-ro Titolavida, kiu hazarde miksiĝis en la amason retiris la jakon de la saltemulo:

"Atendu! La afero ne estas tiel simpla. La baseno havas specialan celon kaj ĝi estas princa bieno. Ĉu ne estas kontraŭjura kaj kontraŭmajesta ensalti tien?" Fariĝis granda disputo. Novaj kaj novaj proponoj alvenis. Oni elektis prezidanton, sinjoron Titolavida.). Fondiĝis du partioj: por-ensaltuloj kaj kontraŭ-ensaltuloj. Intertempe la modesta profesoro kontente rigardis la evoluon de la afero, esperante sian baldaŭnan savon. La situacio ne estis agrabla,

sed rigardu: li konsolis sin, tuj finiĝos la afero. Dume ni filozofadu pri la malbona mortstatistiko...li diris al si mem. Sur la bordo sin anoncis jam la dudeka oratoro:

"Tre estimataj ĉeestantoj" diris laŭtege kaj fiere la nova oratoro, "tio estas fakto..." - "Ne, lakto!" intervenis la profesoro, sed la prezidanto konstatis lian malkompetenton kaj malpermesis al li la parolon. Fine oni elektis komitaton, kies tasko estis, decidproponon fari al la kunveno.

La situacio de la distra profesoro ĉiam malpliagrabliĝis. Lin jam sufokis la lakto-lago. Sed li estis modesta homo kaj li atendis preskaŭ pacience. La komitato post iome longa diskuto revenis kaj raportis, ke ili fondis novajn subkomitatojn por la esplorado de la juraj, kuracistaj kaj ekonomiaj aferflankoj. La distra profesoro sentis, ke jam alvenas la lasta momento. Kion fari? Sur la bordo oni nur disputis. Kion fari? Kion fari? "Heeelp...?"

La profesoro estis ege distra homo kaj antaŭ la fino de la lasta helpkrio, sereniĝe li surbatis sian frunton: "Tute mi forgesis, ke mi, scipovas naĝi!!, diris li kaj elnaĝis.

Se li ne estus elnaĝinta, la fabelo de la eta birdo eĉ pli longe daŭrus.

povas eniri la urbon ne havante la necesan verdan karton. Li foriras preterirante la remparojn, kiam li aŭdas la tri kanonpafojn anoncantajn fuĝon el la punejo. Feliĉe alproksimiĝas enteriga procesio. Li sin ŝovas meze de la sekvantaro; kaj ne rimarkite, li povas foriri en la kamparon.

Vespere li renkontas viron armitan per fusilo. La fuĝinto baldaŭ ekscias, ke tiu homo estas membro de banditaro, kiu priirabas la vojaĝantojn. Li restas kun ili dum kelkaj tagoj, ricevas iom da mono kaj foriras promesinte sekreton. Li fine atingas la grandan urbon Lyon. Li pensas, ke tie li povos sin kaŝi kaj trovi iun rimedon por vivteni sin. Sed li trovas bandon de eks-kondamnitaj, liberigitaj aŭ fuĝintaj. Tia kunularo ne tre plaĉas al li. Li ne povas ne aliĝi al ili. Tamen, tio, kion li timis okazas. Pro malakordo li estas denunciata kaj arestita. Kolerega kaj malespera, li petas aŭdiencon de la ĝenerala komisaro, denuncas siajn perfidajn amikojn kaj helpas por la aresto de aliaj krimuloj. "Tio", li diras en siaj memoraĵoj, "estis mia debuto en kariero tute nova por mi". Kariero, kiu estos plene sukcesa, kvankam li atendis kelkajn jarojn antaŭ ol definitive ĝin alpreni. Rekompence li ricevis liberecon kaj pasporton. Tiel li facile iris ĝis Parizo kaj de tie ĝis Arras.

(daŭrigota)

E. MOTILLON



## SOLVO DE LA VORTO-ĈENO

La ĝusta vorto-ĉeno estas: Padova, Dol-  
laro, Labori, Botelo, Tenoro, Novelo, Verono,  
Romano, Malago, Ladogo, Domeno, Melono,  
Lovenio, Veneno, Nepino, Pirato, Rafano,  
Faruno, Rubeno, Betono, Topazo.

# POR VIA DISTRO

## LITERA ENIGMO

*La solvo konsistas el 90 literoj, kiuj estas numeritaj. La literoj estas  
troveblaj per la sekvantaj ŝlosilvortoj:*

8 7 1 9 11 36 5 24 18 22: balkana lando

6 29 15 25 12 31 54 39: tabaka veneno

14 13 3 15 41 73 20 55 59: ŝtona ĉerko

26 27 65 37 35 16 61: nomo de monato

84 2 76 48 23 10 68 80: nomo de tago

17 48 32 56 86 44 38 45 82: alpa floro

15 42 33 66 19 6 47 11 15 9: granda festo

58 53 21 67 54 78 79 22: orientazia lando

4 52 68 49 50 64 74 75 76 72 25: eŭropa maro

43 51 40 90 88 89: denove diri aŭ fari

14 77 2 60 30 62 39: reĝa bastono

63 83 69 24 71 36 10 1 85 41: favorrajto

46 57 56 87 81 59: bulba floro

70 17 3 32 34 5 28 61: malsupra domparto

1 - 90: interesa aserto de la franca scienculo J.B.L. d'Alembert.

# LA VIVO EN GRESILLON

KUNVENO DE LA KOMITATO – 5an de Julio 1998

Ĉeestas D. kaj P. Babin, H. kaj F. Boyet, G. Dairon, D. Gourdon, P. Métivier, P. Naullet, M. Noulin. Senkulpiĝis: S. Bourot, B. Cheverry, G. Lagrange, Ph. Combote kaj F. Le Magadure. La Komitato registras, kun bedaŭro, la ekŝigon de la du lastaj.

D. Babin konfirmas, ke la Komisiono pri Sekureco rifuzis doni la permeson malfermi la kastelon ĉi jare kvankam la urĝaj laboroj postulataj en septembro 1997 estis faritaj. Inter tempe la postuloj fariĝis pli severaj: laboroj klasitaj "2-a urĝo" iĝis "1-a urĝo" en la raporto de la komisiono de la 31-a de marto 1998. La mono disponebla estis tute uzita por la urĝaj laboroj: refaro komplete de la elektra sistemo kaj instalado de alarmo-sistemo kun fumdetektiloj (400 000 fr.). Ni estis devigataj informi la diverslandajn aliĝintojn kaj repagi la sumon jam ricevitaĵojn. Ĉar ni enkasigis eĉ ne unu frankon pri restadoj, en 1999 ni ne povos pagi eĉ la impostojn. Jen la situacio. Kompreneble la antaŭviditaj prizorgaj aŭ modernigaj laboroj estis nuligitaj. Por malfermi la kastelon en 1999 ni devos trovi monon ne nur por fari la normigajn laborojn sed ankaŭ por realigi la antaŭviditajn plibonigojn. Pli ol 2 milionoj da frankoj estas trovendaj. Ni devas ankaŭ konsideri, ke de kelkaj jaroj, pro la fakto, ke la nombro da esperantistaj renkontoj multiĝis, la nombro da aliĝoj al la grezilionaj staĝoj malkreskis.

Post longaj diskutoj estis decidite proponi al la membro de la asocio tri "solvojn":

- 1) trovi personon, kiu konsentus pagi la necesajn laborojn kaj plene disponus la kastelon dum la jaro krom dumonata somera staĝperiodo de Esperanto;
- 2) La asocio "Kulturdomo de Francaj Esperantistoj" vendas la kastelon, sed daŭrigas siajn kulturajn aktivaĵojn en pli malgranda aĉetita domo aŭ en luita loko.
- 3): trovi la ege grandan sumon necesan dank'al donacoj de esperantistoj. Tiukaze la sumoj kolektitaj estus uzitaj nur se la plena sukceso de la afero estas certigebla.

Estas decidite, ke la Ĝenerala Kunveno okazos la 31-an de oktobro. Laŭstatute duono el la komitato estas ŝanĝota. Nepre necese estas havi novajn kandidatojn, ĉar ne nur la financa sed ankaŭ la administra aspekto estas priatentota.

Diversaĵoj: P. Babin informas, ke li ne plu zorgos pri la redaktado de Kulturaj Kajeroj ekde 1999. Li esperas, ke iu bonvolos sin anonci por eviti la malaperon de la revuo. Diversaj grupoj, el kiuj la Franca Fervoja Esperanto-Asocio, ŝatus estis akceptitaj en la kastelo por diversaj propraj aranĝoj venontjare. Kompreneble la respondo ne dependas de la komitato. Dankoj estas adresitaj al s-ino Blanc, kiu proponas donaci la librojn de sia forpasinta edzo al nia biblioteko.

La kunveno finiĝas je la 16-a horo.

La sekretario: Guy DAIRON



## ----- NIA LIBRO-SERVO -----

Baldaŭ aperos la nova katalogo entenanta la novaj eldonaĵoj. Bonvolu ĝin peti de: S-ino J. VINCENT, 26bis rue de Milngavie, 49150 - BAUGE

|                              |                                      |        |
|------------------------------|--------------------------------------|--------|
| Kelkaj nove akiritaj libroj: | Amparolo - Novelaro (J. Nemere)      | 44 fr. |
|                              | Inter tero kaj ĉielo - gajaj memoroj | 30 fr. |
|                              | Rakontoj ĉe kandela flamo            | 20 fr. |
|                              | Tien romano ( J. Valano )            | 79 fr. |
|                              | Vualo de l'silento ( Ĝura )          | 70 fr. |

### Por aŭkcio - Baza prezo:

|                                          |        |
|------------------------------------------|--------|
| Commentaire et questionnaire (Cart 1906) | 10 fr. |
| Fundamenta Krestomatio (Hachette 1933)   | 30 fr. |
| Literatura Almanako ( Paris 1909)        | 20 fr. |
| La Pirato ( Januaro 1934 )               | 10 fr. |

Prezproponoj akceptitaj ĝis unu monato post apero de ĉi tiu anonco.

Por prepari la ekzamenoj: Por la Praktikantoj (P. Babin - 5-a eldono)

Gramatika Gvidlibro

Preparado al la Atesto pri Kapableco (A. Ribot- 3-a eldono)

Kaj ne forgesu **NIAJN PERKORESPONDAJN KURSOJN.**

( Petu informojn de S-ino VINCENT - vidu adreson supre )



# GRAMATIKO PER BONHUMORO



UL - AN (Difino P.V.)

UL **kun diversaj radikoj** :

ĝibulo, altrangulo, posteulo, tieulo, duulo.

RIM UL estas superflua ĉe pasivaj verboj (ĉar pro konvencio, ITO - ATO - OTO montras personon)

— konato — instruito (anstataŭ konatulo, instruitulo).

AN montras


— **loganton** (ne naciecon) : « germanoj kaj francoj, kiuj logâs en Rusujo estas Rusujanoj kvankam ili ne estas Rusoj ».

— **membron de klubo** : klubano — senatano.

— **adepton de doktrino** : oni uzas ANO aŭ ISTO, laŭ la naciaj kutimoj : Kristano - Budaisto

— **montras simpatiantojn pli ol agemulojn** (esperantano — esperantisto).

— **apartaj sencoj** : policano — policisto.



## Spektaĵoj

Mi ne komprenas kial vi protestas denove !  
Mi jam formetis mian ĉapelon. Cetere mi ne volas formeti mian perukon, ĉar mi ne volas montri min senharulo kiel vi !



## Vidpunkto

Kia bela pejzaĝo ! Kia freŝa aero ! Kia bonfara trankvileco ! Kial oni ne konstruas grandan urbon ĉi tie ? Imagu la feliĉon de la urbanoj, de la dungitoj, de la kampuloj !



## Kontestado

Li estas la plej juna sed la plej bruema ano en sia klubo, kiu propagandas por la egaleco de la rajtoj. Ĉar li rifuzas trinki porinfanan limonadon alportu du aperitivojn.

# Niaj perantoj

**Aŭstrio** : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (250 aŭstr. ŝil.).

**Belgio** : Librovendejo Kariljono, yzw Doornstraat 22. 2610 Wilrijk Akceptas kreditkartojn - prezo : 600 BEF.

**Britujo** : Les Hartridge, 74 Devonshire way, Croydon CRO 8 BS (10 pundoj)

**Danlando** : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (90 kronoj).

**Finnlando** : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (70 mk.).

**Germanujo** : Annelis Rudolf, DACHSBERGSTRASSE, 1 W 3507 BAUNATAL pĉk. Frankfurt (M. 2759 35-609) (25 D.M.).

**Hispanio** : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10°-D 03003 ALICANTE - (1 700 peset.).

**Italio** : Itala Interlingvistika Centro, via Pantano 17, 20122 Milano - pĉk : 42 37 12 03 Literatura Foiro (20.000 liroj).

**Japanio** : S-ro Tara Nišiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaši-Nakano, Hatiōziši TOKYO-

**Jugoslavio** : Jelena Andjelkovic, Nova 61/1, YU-11213 Beograd

**Nederlando** : Gerard van der Horst, Hengelolaan 1158, 2544 GT DEN HAAG poŝtkonto : 39743. (28 fl.).

**Nov-Zelando** : Sino Gwenda Sutton, 12 c Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1 (aerpoŝte : 18 n.z.dol.).

**Pollando** : Pola Esperanto-Asocio, ul. Krucza 38/42 00512 VARSOVIO (15 us. dol.).

**Portugalia** : Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. João Couto, 6, R/C-A - 1500 Lisboā (2.800 esk.).

**Svedujo** : Sveda Esperanto-Asocio, Sōdra Rōrum, pl. 455, S-242 94 Hōrby - p.k. : 2012-3 (80 kr.).

**Svislando** : Esperanto Perkoresponde, Claude Gacond, strato Chevreuils 14, CH-2300, La Chaux-de-Fonds, PK.23-4669-1 (22 s.f.).

**Usono** : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (15 us. dol. - aerpoŝte : 20 us. dol.).

**Aliaj landoj** : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 15 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj. Aerpoŝte : 20 us. dol.



## KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

## ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuala lajn ajn karavanojn frue anoncitan

### Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfera frateca ;  
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;  
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;  
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;  
Por studi specialajn problemojn ;  
Por inter amikoj gaje libertempi ;  
Por ekskursi tra cent-rokoldenta Francujo.

## venu al la ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :  
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, F-49150 BAUGÉ. — Tél. 02-41-89-10-34